La avino kaj kelkaj niaj najbarinoj kolektis monon kun la celo aĉeti bonan donacon por la filino de sinjorino Tahere. Ŝia filino fianĉiĝis kaj ili invitis nin ĉiujn al la postnupta ceremonio. Do oni devis aĉeti bonan objekton por donaci al ŝi. Mian avinon la konatoj konsideris kiel estimatan kaj saĝan maljunulinon kiu kondutis konscie, konis la kutimojn kaj havis bonan guston.

Do ili komisiis al ŝi trovi iun ekskuzon por iri al sinjorino Tahere kaj esplorrigardi la fianĉinan domon por scii kio mankas al ŝi, kaj raporti al kunulinoj por ke ĉiuj kune findecidu kion aĉeti. Do la avino surmetis sian ĉadoron kaj iris al la domo de la fianĉino. Tra virinaj babiloj iom post iom la avino malkovris ke estus bone, se oni havigus al la fianĉino belan kaj taŭgan samovaron.

Huŝang Moradi Kermani

Poste la avino elektiĝis kiel kasisto de la rondo por kolekti monon kaj aĉeti ĝin. Do ŝi petis ke ĉiu unuopa sinjorino pagu iom da mono laŭ la persona ekonomio. Matene de la tago de ceremonio, mia avino, sinjorino Kokab, kaj ŝia bofratino, sinjorino Akram, iris al la bazaro por aĉeti samovaron. Kaj ili irigis min por akompani kaj helpi.

Ni turniĝis kaj turniĝis en la bazaro por trovi la plej bonan. La avino ne estis facile konvinkebla persono, kaj neniu samovaro plaĉis al ŝi. Finfine, en unu koridoro kaj en specifa vendejo, la avino kaj la du kamaradinoj trovis dik-kolan, grand-ventran samovaron kupran kiun la tri ŝatis. Mi ne estis tiom sperta pri samovaroj sed ankaŭ mi ŝatis ĝin. La samovaro flav-ruĝe reflektis la lumon. Ĝi simile al spegulo montris niajn vizaĝojn. Nur la reflekto iom malbeligis nin kaj deformis la bildon de niaj vizaĝoj, okuloj kaj nazoj sur sia kurba surfaco. La avino decidis aĉeti ĝin kaj per tiel bona donaco havigi al si mem kaj al kunulinoj respekton kaj honoron ĉe la fianĉina familio. Sed la samovaro estis iom multekosta kaj la kolektita mono ne sufiĉis por ĝin aĉeti. Ju pli la avino kaj la du amikinoj marĉandis, des malpli ili sukcesis konsentigi la vendiston kaj malaltigi la prezon. Li ne moliĝis kaj neniel akceptis doni eĉ unu moneron da rabato.

Dio benu la animon de mia avino[1]. Se io plaĉis al ŝia okulo, ŝia koro ne povis forgesi kaj preterpasi ĝin. Do la avino diris al sinjorino Kokab: "Mi allogiĝis al ĉi samovaro. Ni aĉetos aŭ ĝuste ĝin, aŭ neniun alian. Mi persone pagos la reston de la mono. Ni aĉetu altkvalitan aferon danke al kiu la fianĉino memoru nin kaj ĉiam preĝu por ni dum uzado. Mi volas ke la donaco estu bona memoraĵo".

Kaj mia avino aldonis iom da mono al la kolektita sumo kaj post perfekta ekzamenado la tri sinjorinoj aĉetis la samovaron.

Certe porti la samovaron de la bazaro ĝis la domo estis mia tasko. La avino kaj la du kunulinoj ordonis al mi ege zorgi kaj atenti ke la perfekta dik-kola grand-ventra samovaro survoje ne difektiĝu; kaj ke ĝiaj du teniloj aŭ ĝia krano ne rompiĝu… fine ili memorigis kaj avertis al mi ke, se okazos malbono al la samovaro (Dio ne permesu!), mia malfeliĉa avino devos respondi kaj klarigi al cent virinoj... Do mi (nur Dio scias kiom zorgeme) brakumis la dikan pezan samovaron kaj portis ĝin. La avino kaj la du kunulinoj survoje ne tiom atentis mian penadon. La tri iris antaŭ mi iom distance kaj inter si rapide kaj ne-

1 Preĝo por forpasintoj en la persa lingvo; per ĉi frazo la leganto komprenas ke, kiam la protagonisto rakontas la historion, lia avino jam ne plu vivas. – *Ĉiuj notoj: tradukinto.*

42

konsidere babilis, kaj senzorge kaj laŭte ridadis, dum malantaŭe mi ŝvite kaj anhele portis la pezan samovaron. La samovaro sane kaj senmakule atingis nian domon dank' al tio, ke mi sur la vojo brakumis ĝin kiel bebon kaj ne permesis ke ĝia koro batu maltrankvile!!! Sed mi vere laciĝis kaj miaj brakoj, manoj kaj talio ne plu havis sensivon pro la doloro. En la domon venis la aliaj amikinoj de la avino kaj, vidinte la samovaron, ili gaje aplaŭdis ŝian bonan guston. Sinjorino Kokab poste kolektis de la amikinoj kaj najbarinoj la aldonan sumon kiun la avino mem pagis por la samovaro. Do oni repagis la diferencon por ke la avino ne elspezu tiom multe kaj por ke la pagita sumo por ĉiuj estu egala.

Ĉio ruliĝis kvazaŭ sur reloj ĝis sinjorino Kokab diris: "Nu! Maĝid portis la samovaron de la bazaro al la domo. Do estus bone, se li posttagmeze plu portus ĝin al la domo de la fianĉino kaj ni sinjorinoj iom poste irus tien kune".

Mi uzis mian ĉiaman ekskuzon kaj replikis: "Mi havas milojn da aferoj por fari posttagmeze. Mi devas fari hejmtaskojn kaj prepariĝi por postmorgaŭa ekzameno. Kaj se mi ne sukcesos bone trapasi tiun ekzamenon, mi malfeliĉiĝos en la lernejo. Dio longigu vian vivon, se vi pardonos min kaj lasos min ne fari ĉi taskon!"

Aŭdinte min, la ĉeestantinoj unuvoĉe plendis. Ili ne atendis ke por fari tiom simplan taskon, mi forkurus de vira respondeco. La avino diris: "Ne gravas, kara mia. Nur portu la samovaron tien kaj tuj revenu hejmen por fari lernejajn hejmtaskojn".

Sinjorino Kokab, kiu estis ŝercema kaj bonhumora virino, turnis al mi la vizaĝon kaj diris: "mi volis edzigi vin al mia filino, kiam vi grandiĝos. Sed mi devas rekonsideri mian opinion, ĉar mi ne volas pigran bofilon".

Ŝia kvar-jaraĝa filineto, aŭdinte la patrinon, hurlis eksplorante: "Ne. Mi ne amas Maĝidon".


Mia naiva avino, kiu rigardis la aferon tro serioze, diris al la infaneto: "Kial vi ne amas lin? Kio estas malbona en li?"

Mi konsciis ke, se mi ne intervenos, okazos kverelo, ĉu post jaroj mi devos aŭ ne esti ies edzo kaj ĉu mi estas bona aŭ malbona bofilo por iu alia... Do por kvietigi la disputon, mi diris: "Bone! Ordonon de sinjorinoj mi obeos. Mi portos la samovaron. Nur ne plu kverelu nun. Bonvolu trovi biciklon por ke mi povu fiksi samovaron sur ĝi kaj ne plu tiel laciĝi. La pezo de samovaro paralizis miajn manojn kaj brakojn". Sinjorino Kokab akceptis peti la edzon, ke li pruntedonu al mi sian biciklon, por ke mi portu la samovaron pli facile.

Huŝang Moradi Kermani

Je la dua posttagmeze oni envolvis la samovaron en novan kaj belan tukon, kaj por ke ĝi dum transmoviĝo ne elglitu kaj terenfalu, sinjoro Hosejn, la edzo de Sinjorino Kokab, firme fiksis ĝin per ŝnuro sur la malantaŭa sidloko de sia biciklo. La avino eligis la kranon kaj metis ĝin en la samovaron, ke ĝi ne rompiĝu survoje. Oni faris ĉion, kion oni devis fari por garantii la sekurecon de la samovaro, kaj poste komenciĝis avertoj kaj predikoj: "Vi ne rajtas rajdi la biciklon. Nur marŝante puŝu ĝin. Ĉar se eble vi ne zorgos kaj estos truoj sur la vojo la samovaro falos...".

Ĝis la fino de la unua aleo mi havis la rekomendojn de la avino kaj ŝiaj kunulinoj en miaj oreloj. Sed nur post kiam mi pasis tra du-tri aleoj kaj kiam mi atingis la straton, mi ekpensis ke estas tute stulte se mi nur puŝos la biciklon. La biciklo ne estas kreita por transporti samovarojn. Ĝi estas farita por ke homoj saltu sur ĝin kaj premu ĝiajn pedalojn por atingi rapide sian celon. Do mi ignoris la rekomendojn kaj forĵetis ilin de miaj oreloj, saltis sur la biciklon kaj ekpedalis. Zorgeme mi moviĝis, ke nenio malbona okazu al la samovaro. La selo de la biciklo estis alta kaj miaj piedoj apenaŭ atingis la pedalojn. Mi tuj deseliĝis kaj apogis la bicikiclon al arbo flanke de la strato. Poste refaldis la krurojn de mia nova aminda pantalono kiun mi surmetis precipe por la ceremonio por ke ĝi ne malpuriĝu. Tiel mi povis sidi sur la meza stango de la biciklo kaj ne tiom malfacile puŝi la pedalojn.



Huŝang Moradi Kermani. Foto: La aŭtoro

La vojo estis plena de ŝtonetoj kaj sableroj. La biciklo dume falis en la voj-truojn kaj la samovaro tremis sur la malantaŭa sidloko de la biciklo kaj la krano en ĝia ventro faris bruon... dang, dang, dang... Mi ne atentis la bruon kaj nur rapide rajdis. Fine la samovaro ree venis sane kaj senmakule al sia celo. Sed mi nur ne emis sole eniri en la domon antaŭ la alveno de mia avino kaj ŝiaj kunulinoj. Ili decidis ke tuj poste mi eliĝu, sed nun mi atingis la domon

44

tre frue kaj ne emis atendi ilin dum duonhoro aŭ eĉ pli. Por pasigi la tempon ĝis ilia alveno, mi decidis iri al Onklino Soqra, kies domo ne malproksime situis.

Mi delonge ne vidis Onjon. Ni du venis de la sama vilaĝo al la urbo Kerman. Ŝi estis afabla, pia sed malriĉa virino kiu vivis sole. Kiel sian filon ŝi amis min, ĉar post la morto de mia patrino, kiam mi ankoraŭ estis eta bebo, ŝi mamnutris min. Mi aŭdis ke lastatempe ŝi estas malsana, do mi decidis viziti ŝin kaj demandi pri ŝia sano.

Do mi turnis la biciklon en la direkton de ŝia domo. La kortopordo estis malfermita. Mi eniris puŝante la biciklon. La malfeliĉulino kuŝis sur tapiŝo, sub arbo en la domkorto. Kiam ŝi vidis min, ŝi tutvizaĝe ridetis kaj ŝiaj okuloj ekbrilis. Ŝi stariĝis, venis al mi, min brakumis kaj ekploris. Larmoj falis de ŝiaj okuloj kaj ŝi singultis: "Kia miraklo! Ĉu la suno hodiaŭ elleviĝis de okcidento? Kiu kredas ke Maĝid venas por vidi min? Ho! Kiom multe mi nutris vin per miaj mamoj! Kiom mi zorgis pri vi! Vi ne kredos, sed tagon post tago mi nur rigardis al ĉi pordo kaj atendis ke iam vi, forgesema filo, venu viziti min. Finfine mia revo realiĝis kaj vi venis… Bonvenon. Kiel feliĉa mi estas! Vi plene gajigis min!"

Verdire ŝiaj frazoj kaj larmoj tuŝis mian koron kaj ankaŭ miaj okuloj pleniĝis de larmoj. Mi apogis la biciklon al la muro. Per angulo de sia ĉadoro, Onklino Soqra sekigis la larmojn de la vizaĝo kaj diris: "Ni iru en la ĉambron. Eksidu kaj rakontu nun, de kie vi venas? Kion vi faras? En kioma klaso vi studas?"

Mi volis eniri en la ĉambron kaj iom paroli kun Onjo… sed subite mi vidis ke du grandaj katoj ludas malantaŭ la biciklo kaj saltadas tien kaj reen. Mi diris al mi mem: "Ĉi du katoj certe faligos la biciklon kaj rompos la samovaron, kaj mi devos klarigi kaj respondi al multaj homoj…". Do mi malnodis la ŝnuron de la samovaro, brakumis kaj portis ĝin en angulon de la ĉambro por repreni ĝin, kiam mi foriros. Onjo Soqra vidis la samovaron. Ŝi ree brakumis kaj kisis min, kaj denove ekploris: "Kiom afabla kaj bona estas mia aminda Maĝid. Certe vi pagis multe por ĝi. Mi neniam atendis ke vi portu al mi tiom multekostan donacon". Kaj poste ŝi respondis al si mem: "Kial mi ne atendu?! Mi devas atendi. Mi nutris vin per mia propra lakto. Mi kreskigis vin. Mi certe atendas ke vi ne forgesu mian amon. Dio longigu vian vivon. Dankon, kara Maĝid. Kiel zorgema vi estas".

Kelkfoje mi klopodis diri: "Kara Onjo Soqra, ĉi samovaro ne estas via". Sed mi sentis ke mia lango kudriĝis al la gorĝo. Nur mi petege rigardis al ŝi kaj kuraĝigis min mem: "Iom post iom mi klarigos al ŝi. Se mi subite diros, ŝi ofendiĝos kaj eĉ eble ŝia koro ne toleros tiom da emocio".

Onjo Soqra iris al la samovaro kaj malnodis la tukon kiu kovris ĝin. Ŝi daŭrigis: "Kiel vi sciis ke mi ne havas samovaron? Ĉi tagojn mi faras teon per fera bolkruĉo. Mi havas samovaron sed ĝi estas tiom aĉa, ke eĉ Dio ne emas ĝin malbeni[2]. Mi kelkfoje portis ĝin al la riparisto sed ĝi ne reboniĝis kaj ankoraŭ de ĝia krano falas akvogutoj.

Ŝi levis la vizaĝon al la ĉielo kaj diris: "Kiel afabla estas mia Dio. Ĉu vi scias? Pasintnokte mi en sonĝo vidis sinjoron kun lumanta vizaĝo. Li surhavis verdan zon-ŝalon. Li venis en mian domon kaj donis al mi pakumitan donacon... Ĉi samovaro estas realigo de tiu sonĝo".

Mi nur fiksrigardis al Onjo Soqra, kiu gaje marŝis ene de la ĉambro de unu flanko al alia. Kelkfoje mi volis salti kaj preni ŝian manon en miajn, ĉion rakonti al ŝi klare kaj liberigi min de tiu ĥaosa miskompreno... sed al mi mankis kuraĝo. Kion fari? Mi malsekigis miajn lipojn per la lango kaj nur klopodis rideti. Onjo Soqra brakumis la samovaron kaj prenis ĝin al la centro de la ĉambro. Poste bone rigardis ĝin: "Ma-Ŝa-Allah![3] Kian bonan guston vi havas. Mi supozas ke via avino aĉetis ĝin. Ĉu ne? Kiel ŝi fartas? Ŝi ankaŭ suferis multe por kreskigi vin, de kiam vi orfiĝis". La malfeliĉa maljunulino gaje parolemis kaj demandis pri ĉiuj miaj parencoj kaj konatoj. Poste, kvazaŭ al ŝi venis bona ideo. Ŝi rigardis al alia direkto kaj proponis: "Nun per ĉi samovaro mi faros bonodoran teon kaj ni kune trinkos". Ŝi etendis la manon por malfermi la suprajon de la samovaro kaj pretigi ĝin por fari teon. Subite kaj pretervole mi kaptis ŝian pojnon por eviti tion. Silente ŝi ridetis kaj demandis: "Ĉu vi mem volas verŝi akvon en la samovaron kaj bruligi karbon por boligi ĝin? Bone... Vi mem faru. Sanon al via mano!"[4]

Kion fari? Tremis miaj manoj dum mi pretigis la samovaron. Kun silenta lango kaj maltrankvila koro mi verŝis akvon en la samovaron kaj bruligis karbon por varmigi ĝin. Mi diris al mi mem: "Trinkante la teon mi iom post iom ĉion rakontos al ŝi". Onjo Soqra iris al malantaŭa ĉambreto kaj portis al mi teleron kun du sekiĝintaj granatoj kaj kelkaj juglandoj. Ŝi metis la teleron

2 Tradicia persa esprimo.
3 Dio benu vin!
4 Dank-preĝa frazo en la persa.

antaŭ min sur la tapiŝo kaj diris: "Iuj diras ke post foriro de miaj gefiloj, mi ne plu havas iun, kiu prizorgas min. Sed mi havas vin. Ili devas veni kaj vidi ke vi vizitas min kaj prenis por mi ĉi belan samovaron".

Mia koro pli kaj pli maltrankviliĝis. Mia menso estis ĉe la avino kaj ŝiaj kunulinoj en la fianĉina domo. Certe ili atendas min kaj nervoziĝas, ne sciante kie mi estas kaj kio nun okazas al la samovaro.

La akvo en la samovaro brue ekbolis. Mi senmove kiel statuo sidiĝis kruc-krure sur la tapiŝo kaj rigardis ĝin. La samovaro boligis la akvon. Ĝia ega korpo tremetis senpacience. Varmega vaporo forflugis tra la truoj kaj la superaj randoj de la samovaro. Kune kun la samovaro mi interne kaj senpacience bolis kaj tremtremis, kaj mia kapo estis ege varma. "Se mi nur povus peli la langon kaj diri al ŝi la veron!". Sed mi ne kapablis. Onjo Soqra ĵetis manplenon da sekaj tefolioj en la argilan kruĉon kaj el la samovara krano verŝis bolantan akvon sur ilin. Poste ŝi metis la kruĉon sur la samovaron por ke la teo dumtempe infuziĝu.

"Kara Maĝid! Vi manĝu ĉi granatojn kaj atendu iomete. Mi revenos tuj", ŝi diris.

"Onjo Soqra! Ĉu vi aŭdis ke filino de sinjorino Tahere fianĉiniĝis? La avino hodiaŭ volas iri al ŝia postgeedziĝa ceremonio. Kial vi ne iris? Se vi irus, estus bone, se vi donacus al ŝi SAMOVARON!" Por findiri ĉi frazon, mi pli malpli sufokiĝis… sed ankoraŭ ne sukcesis klare elbuŝigi tion, kion mi vere volis diri.

Onjo Soqra, surmetante siajn sandalojn por iri al la korto, tiel respondis: "Ili ne invitis min. Ne gravas. Mi havas vin kaj ne bezonas ilin". El la mezo de la domkorto Onjo laŭte vokis la du najbarinojn tra la muro: "Venu! Maĝid venis. Tiu knabo, pri kiu mi antaŭe parolis. Tiu, kiun iam en vilaĝo mi mamnutris. Li alportis al mi unikan samovaron kiun neniu alia similas en la mondo. Venu por trinki teon kune. Dio mia! Maljunigu lin kaj ne malsanigu!"[5]

Iom da tempo pasis kaj venis du maturaj najbarinoj por trinki teon kaj vidi min. Ilia alveno eĉ pli komplikis la situacion. La lango de Onjo Soqra senhalte peliĝis por laŭdi min. La du najbarinoj superŝutis min per siaj admiraj rigardoj kaj senfinaj aplaŭdoj. Mi trinkis la teon, sed mi sentis la guston de maldolĉaj tradiciaj medikamentoj kiujn la avino perforte igis min trinki, kiam mi malsaniĝis. Miaj lipoj tordiĝis kaj la teon mi ne povis engluti facile. La reflekto de mia vizaĝo sur la samovaro mimike mokis min. Mi cerbumis: "Kion faras nun la avino? Kion ŝi diras al siaj amikinoj? Ĉu ŝi eliris el la ceremonio kaj

5 Tio estas, "Longa estu lia vivo ĝis maljuna aĝo sed neniam li malsaniĝu", dankpreĝa frazo en la persa.

serĉas min sur la stratoj? Ve… Kial mi devis porti la samovaron ĉi tien?" Duonmanĝinte la granaton kaj duontrinkinte la teon, mi haste stariĝis de mia loko kaj diris: "Adiaŭ! Mi volas foriri. Estas malfrue".

Onjo Soqra metis pecon da sukera bombono en la tukon kiu ĵus kovris la samovaron. Poste ĝin kvarangule faldis kaj redonis al mi.

"Restu ĉe mi por vespermanĝo", ŝi petis.

"Mi ne povas. Bonvolu permesi min foriri. Nur peton mi havas. Ĉu eblas redoni al mi la samovaron? Ĝi ne estas tiom bonkvalita. La akvo en ĝi ne tiom rapide bolas. Mi poste portos por vi alian pli belan kaj pli grandan samovaron. Ĉi tiu ne vere taŭgas"

Onjo Soqra ree brakumis min kaj larmoj denove kovris ŝiajn okulojn: "Kion vi diras, kara mia? Ĝi estas la plej taŭga samovaro. Kiel bonkora kaj naiva vi estas! Ĉi samovaro por mi estas tre bona kaj sufiĉe granda. Salutu vian avinon miaflanke. Diru al ŝi ke Onjo dankis kaj tre ŝatis la samovaron, kaj kiel gaja mi estas pro via vizito. Tiu sukera bombono estas benita en sanktejo. Ŝi manĝu ĝin por resaniĝo de krurdoloro. Nu! Vi ekiru, ke la avino ne maltrankviliĝu".

Elirinte el la domo, mi estis konfuzita de dilemo. Mi ne sciis ĉu gaji aŭ malgaji. La aranĝo de la sorto samtempe estis ĝoja kaj malĝoja por mi. Onjo Soqra nun havas bonan kaj belan samovaron… do pro tio mi ĝojis. Kaj mi malĝojis, ĉar certe la avino falis en problemon, perdis sian reputacion kaj senhonoriĝis ĉe siaj konatoj.

Mi ne povis iri al la domo de la fianĉino kun malplenaj manoj. Sed subite ideo sparkis en mia kapo.

Mi rajdis sur la biciklo kaj reiris al nia domo. Enirinte la korton, mi vidis ke la ĉambra pordo estas ŝlosita. Mi sciis kie la avino kaŝas la ŝlosilon. Mi trovis ĝin en la florvazo apud la pordo. Mi malfermis la pordon kaj eniris. Unue mi metis la suker-bombonon en bovlon, kaj poste prenis kadukan kaj malnovan samovareton de mia avino, bone envolvis ĝin en la tukon kaj poste per ŝnuro firme fiksis ĝin sur la biciklo. Fine, mi eliris kaj fermis la pordojn, kaj kiel kuglo rapide rajdis al la domo de la fianĉino.

Tiel, kiel mi pensis, la koro de mia avino pro anksio preskaŭ elsaltis el ŝia brusto. Etendante sian kolon, ŝi de la ĉambra fenestro rigardis al la pordo kaj la korto, nesciante, kiam mi atingos la domon kaj kien mi iris. Ŝi sidiĝis meze de la gastoj, en la kvinporda larĝa ĉambro. La fianĉino kaj ŝia patrino gaje sidis kiel gastigantoj en la antaŭa flanko de la ĉambro.

Kiam la avino vidis min eniri la korton kun la kovrita samovaro en mia mano, pro ĝojo ŝi preskaŭ stariĝis, sed tuj regis sin kaj denove sidiĝis en sia loko sur la tapiŝo. Nur geste ŝi indikis al mi, ke mi envenu kaj metu la donacon antaŭ la fianĉinon. Kelkfoje mi klopodis mimike peti ŝin veni ekster la ĉambron por ĉion konfesi al ŝi. Sed ŝi ne moviĝis. Do mi iris en la ĉambron, metis la envolvitan samovaron antaŭ la fianĉinon kaj poste, rapide kiel timanta muso, revenis al la korto.

La avino diris al la patrino de fianĉino: "Ni ankaŭ kune preparis etan donacon por nia bela fianĉino. Ŝi ŝatos ĝin In-Ŝa-Allah[6]". Poste ŝi stariĝis kaj iris al la samovaro. Mi vidis ke ŝi iom strange rigardas al la tuko kaj la samovaro. Apoginte mian dorson al la muro, el la korto mi povis vidi ĉion. Tra fenestroj mi kurioze enrigardis la ĉambron por scii kiel la afero disvolviĝos kaj la finon de la situacio. Mia koro batis kiel koro de timanta pasereto sub pluvego. "Dio mia! Savu mian avinon kaj ne lasu ke ŝia koro haltu!", mi preĝis.

La avino malfermis la unuan nodon kaj la ĉeestantoj komencis manklapi kaj aplaŭdi. La avino ege ĝojis. Sinjorino Kokab kaj aliaj kunpagintoj de la donaco ridetis tutvizaĝe. Sed kiam la dua nodo malligiĝis, iu aĉa, nigre bruliĝinta, kaduka kaj malpura samovaro aperis kaj montris sin al la ĉeestantoj. La buŝo de la avino restis malferma. La manklapado de la gastoj ĉesis kaj tutvizaĝaj ridetoj de donacantinoj tuj malaperis. Kelkaj junaj fraŭlinoj subite ekridis kaj ilia rido plenigis la ĉambron. La avino ne plu povis teni sin duonsida. Ŝi surteren falis kaj sidiĝis ĉe la samovaro. Ŝvito plenigis ĉiujn sulkojn de ŝia maljuna vizaĝo kaj ŝi apogis sian frunton sur polmo.

"Dankon kara Avinjo! Ni ne atendis de vi tiom multe", la patrino de la fianĉino diris.

Mi tremis kaj premis miajn dentojn sur miajn lipojn dum mi rigardis la ŝokitajn vizaĝojn de la gastoj.

"Kie estas la samovaro kiun ni aĉetis?", sinjorino Kokab demandis.

La avino ne sciis kion diri. Ŝi nur puŝis la manojn sur la tapiŝon kie ŝi sidis kaj pene stariĝis. Ŝia vizaĝo flaviĝis kiel safrana siropo kaj ŝi ne havis forton por movi sin. Mi volis eniri kaj preni ŝian brakon por helpi ŝin stari. Sed antaŭ mia movo, la avino mem ekpaŝis kaj venis al la korto. Ŝia rigardo min serĉis sed, kiam ŝi vidis min, ŝia lango ne plu funkciis. Ŝi ne sciis, de kie komenci kaj kion demandi… Mi prenis ŝian manon kaj gvidis ŝin al la akvujo en la centro de la korto, ke ŝi lavu la vizaĝon kaj iomete trankviliĝu. Poste mi

---

6 Se dio volas (arabe).

akompanis ŝin al la kortangulo, sidigis ŝin sur la ŝtuparo kaj rakontis al ŝi pri mia vizito al Onjo Soqra. "Nun vi perdis vian reputacion. Sed ne permesu ke ankaŭ mi perdu la mian kaj ne senhonorigu min ĉe Onjo Soqra. Bedaŭrinde vi ne estis kun mi kaj mem ne vidis kiel multe ŝi ĝojas. Mi mem kolektos monon kaj aĉetos alian samovaron. Ne estu trista". Poste mi kisis ŝian manon. La avino estis saĝa kaj pardonema virino. Post kiam ŝi finaŭdis mian parolon, ŝi vokis sinjorinon Kokab al la korto. Tiel sinjorino Kokab ankaŭ iom post iom komprenis la situacion, kaj, ĉar ŝi pli bone povis paroli ol mia avino, ŝi eniris kaj mem rakontis ĉion al sinjorino Tahere kaj ŝia filino. Kiam ili sciis ke bela kaj multekosta samovaro estis destinita al la domo de Onjo Soqra, ili ne plu plendis kaj multe ridis.

Hejmenporti la brule nigriĝintan samovareton estis mia tasko. Ankaŭ mi devis reiri al la bazaro kaj aĉeti novan samovaron. Dum la sekvaj du-tri tagoj mi fariĝis la samovar-portisto de la kvartalo. Kaj la avino kaj najbarinoj ĉiam kaj ĉie precize zorgis ke miaj manoj kaj piedoj survoje ne mismoviĝu kaj mi ne vizitu iun ne atenditan parencon, por ke la dua samovaro trafe kaj ĝuste atingu la manojn de la fianĉino.

ماهی سیاه کوچولو به چین رسید – توسط اسپرانتو

ترجمه‌ی اسپرانتوی کتاب معروف صمد بهرنگی، ماهی سیاه کوچولو که توسط خانم منیره فهمی، از اسپرانتودانان متبحر ایرانی، انجام شده است و اخیراً انتشارات بهجت آن‌را منتشر ساخته است، به‌یاری آقای ساعد عباسی، اسپرانتودان ایرانی ساکن چین، در باشگاه اسپرانتوی دانشگاه زبان‌های خارجی شانگهای، معرفی و در نشستی جمعی توسط اعضای این باشگاه قرائت گردید.

آقای عباسی که گرداننده‌ی این نشست کتاب‌خوانی دست‌جمعی بودند، در ابتدا گزارشی از سفر اخیر خود به ایران، و از جمله دیدار دسته‌جمعی اسپرانتودانان با آقای هوشنگ مرادی کرمانی به مناسبت ترجمه‌ی داستان سماور به اسپرانتو توسط ایشان و ایراد یک سخنرانی با همکاری باشگاه اسپرانتوی دانشگاه علامه در مرکز زبان علامه درمورد جشن ۷۰سالگی مجله‌ی بی‌نظیر و بین‌المللی «پیام یونسکو » و انتشار مجله‌ی پیام یونسکو به زبان اسپرانتو، چین، زبان چینی و تأثیر اسپرانتو بر نحوه‌ی نوشتن آن، اشاره کردند.




آقای عباسی (در وسط عکس) و جمعی از اعضای باشگاه اسپرانتوی دانشگاه زبان‌های خارجی شانگهای که در جلسه‌ی کتاب‌خوانی دست‌جمعی ماهی سیاه کوچولو به زبان اسپرانتو شرکت کردند.

آقای عباسی در این نشست در شهر شانگهای در ضمن مقدمه‌ای نیز در رابطه با کتاب ماهی سیاه کوچولو، در مورد این اثر و نویسنده‌ی آن و تبدیل شدن این کتاب به اثری کلاسیک در حوزه‌ی ادبیات کودک و نوجوان ایران صحبت کردند.

در پایان این جلسه، تعدادی از اعضای چینی این باشگاه علاقمند به تهیه و مطالعه‌ی کتاب «جاناتان مرغ دریائی» (Jonathan Livingston Seagull) نوشته‌ی ریچارد_باخ (Richard Bach) نیز شدند تا آن را با این کتاب مقایسه کنند، چرا که در دیباچه‌ای بر این ترجمه‌ی اسپرانتو، گفته شده است این دو کتاب قابلیت مقایسه با یکدیگر را دارند، و چنین پژوهش تطبیقی‌ای نتایج جامعه‌شناختی جالبی را به‌دست می‌دهد.

Poemo el Ferejdun Moŝiri (1926-2000), unu el la plej eminentaj nuntempaj poetoj de Irano, kiu poemis kaj en la modernaj kaj en la klasikaj stiloj de la persa poezio

Tradukinto: M. Fahmi



De Dio ne alvenas voĉo

Ho, steloj, kiuj el malproksima mondo,
Rigardoj viaj fiksitas al niaj okuloj senlumaj.
Ĉu vi jam aŭdas ion pri la tero kaj la homo?
Inter la klara bluo de l' ĉielo,
Ĉu vi jam ne vidas ondon de fumo, sango kaj fajro?
*
Tiu ĉi suferiga polvo, kiu enestas la koron de l' spaco,
Tiu ĉi horora regiono, kiu en l' spaco ellasitas,
Tiu ĉi maluma domo, kiu estas nia loĝej',
Intencas pereigi vin!
*
Se viaj oreloj mian lamenton konas,
De l' spacŝipo iranta al la luno,
De l' vojaĝanto ekaperanta el voj-polvo,
De l' intrigema tero, gardu vin!
Se la piedo de tiu ĉi homo atingos sur la ĉielon,
Via tagaro, kiel la nia fariĝos nigra!
*
Ho stelo, kiu estas antaŭ miaj okuloj,
Vi ne kredivas, ke sur la tero,
Kie ajn vi atingas kiun ajn,
Tiu kaŝintas ponardon malantaŭ si!
Malantaŭ ĉiu ridet-burĝono,
Kordoloriga dorno de ruzo ekfloras!
*
Kiu invitas vin kun amo,
Krom forrabo de via koro ne pripensas alion!
Se estas luma lampo sur vojo via,
Tio estas okuloj de eterne malsata lupo!
*
Ho stelo,
Nia saluto estas preteksto,
Nia amo, estas eterna mensogo!
Sur la tero, oni fortranĉis la rajto-langon,
La rajto, lingvo de skurĝo estas!
Kaj tiu, kiu kun vi korelverŝas sincere,
Nokta plorsingultado estas!
*
Ho stelo, vi ne kredas:
Inter la sen-kanzona ĝardeno de l' ter',
La verdaj tigoj de reamikiĝo estas rompitaj,
La ruĝaj tulipoj de amikeco estas depremitaj,
La nove maturaj burĝonoj de l'

esper',
Neekridinte jam mortas!
La alta flago de vereco-cipreso,
La kapon sur ĉagren-teron jam cedas!
*
Ho stelo, vi ne kredas:
Tiu aŭroro, kiu serene kaj kokete,
En la spaco senlima ekaperis,
Jam forfuĝas de l' tero!
Tiuj ĉi aŭroroj plu ne estas aŭroroj,
La koloro de l' tervizaĝ' jam paliĝas!
*
Tiu aŭrora papaveto, kiu ekfloradis
Dum vesperoj inter la ondo de l' lumo,
Jam fortiras la jupon de la tero.
La ruĝeco kaj bluo de l' horizonto,
Estas popol-koroj en sango kaj tero!
Fumo kaj fajro atingis la ĉielon!
*
La helaj nuboj, kiuj kiel silkaĵo,
Estis la lito de l' lun-novedzino,
Estas kotonoj kontraŭ oldaj cikatroj!
*
Ho stelo, ho fremda stelo!
Ne parolu pri la homo kaj ne demandu la teron!
Sub la kriego de kugloj ardaj,
Pri sereneco de vangoj varmegaj ne demandu!
Sub vango-frapoj de dolorigaj torturoj,
Ne demandu pri la degenero de vizaĝoj ĉarmaj!
Antaŭ la okuloj de infanoj senrifuĝejaj,
Ne demandu pri la rigardoj de hontaj patrinoj!
*
En infero, kiu izolitas de la mondo,
En infero, kiu antaŭ okuloj de Dio estas,
Pri la ardego de fornoj kaj montoj da kadavroj,
Pri la ekkrioj de vivantoj inter flamoj,
Ne plu demandu!
Ne plu demandu!
*
Ho stelo, ho stelo fremda!
Se Dio nin jam ne forgesas,
Kial li ne helpas nin?
La sono de nia plorado atingis la ĉielon
Kial de Dio ne alvenas voĉo?
*
Ni lasu tiujn ĉi dolor-kanzonojn,
Ni lasu tiujn ĉi amar-fabelojn,
Pardonu min, ho vi stelo, pasis la nokto,
La nigra rakonto de l' terpopolo,
Baris la vojon al via delikat-dormo.
Forfuĝas de mia malvarma plorkriado,
Via orelo, kiu ne bezonas kanzonon!
*
Ho tiu, kies jupon ne atingas mia mano,
Mia larmo gutas sur vian jupon!
*
Kun ĉarma maten-zefiro,
Via laca okulo fermiĝas.
Sen vi en murego de ĉi nigra nokto,
Miaj noktaj plor-kompleksoj,
Ekrompiĝas en la gorĝo!
Bonan nokton…!

آیا زبان اسپرانتو هم دارای فرهنگ خود هست؟

منبع: Turka Stelo/ سپتامبر ۲۰۱۸
نویسنده: یولیان مودست
برگردان از اسپرانتو: ا. فکـری

چیزی به اسم فرهنگ اسپرانتو وجود دارد؟ این یکی از سوالات معمول اسپرانتودانان است. به باور بسیاری از ایشان، اسپرانتو فرهنگی کاملا مستقل و ویژه خود دارد. زیرا اسپرانتو با پشت سر گذاشتن بیش از یک قرن از عمر خویش، ادبیاتی اصیل و غنی خلق کرده و ترجمه‌های ارزشمند بسیاری نیز به این زبان منتشر شده است. ادبیات نمایشی و حتی موسیقی اسپرانتو هم کم نیست. این‌ها همه فرهنگی بدیع ــ هرچند غیرمتعارف ــ پدید آورده که حالا جزئی از فرهنگ گسترده جهانی است.

از دیگرسو، گروه مقابل این دسته از اسپرانتودانان خرده می‌گیرند که اسپرانتو تنها یک ابزار و زبانی است که انسان‌هایی از ملل و اقوام مختلف به آن تکلم می‌کنند و به صرف وجود آثار ادبی و نمایشی نمی‌توان مدعی موجودیت فرهنگ مستقل اسپرانتو شد؛ چراکه اسپرانتو (با وجود عمر و تاریخ نسبتا کوتاه خود) فاقد سنت‌های کهن فرهنگی و گروهی از انسان‌های منسجم با ویژگی‌های مشترک دیرینه زبانی، تاریخی و نژادی (یعنی ملت) است.

به نظر نگارنده، هرچند این خرده‌گیری فاقد منطق نیست، لیکن شاید بتوان مصداق آن را تنها در دوره اول رشد و گسترش جنبش اسپرانتو پیدا کرد. در این دوره، با وجود این‌که از ابتدا به ساکن، آثار ادبی اصیلی به اسپرانتو خلق شد، اما نمی‌شد از پیدایش فرهنگ اسپرانتو سخنی به میان آورد. چون درحقیقت اولین آثار ادبی را اسپرانتودانانی از کشورهای مختلف خلق کردند که تنها ویژگی مشترک پدیدآورندگانشان زبان اسپرانتو بود. اما نکته مهم اینجاست که با خلق اولین آثار، هسته اصلی فرهنگ آینده اسپرانتو نیز پدیدار گشت. بدین معنی که اسپرانتو نه‌تنها در پی حل مشکل زبان جهانی است، بلکه آرمان عالی آن ایجاد صلح و دوستی میان انسان‌هاست که در اولین آثار هم به‌وضوح تبیین شده است. آرمانی که به‌تدریج در ادبیات اسپرانتو تبدیل به اصل اساسی گردید، به طوری که هم‌اکنون ویژگی بارز ادبیات ما انسان‌دوستی است.

فرهنگ پدیده‌ای است که نزد هر ملت بطئی و طی زمانی متمادی شکل می‌گیرد. تکوین هریک از فرهنگ‌های ملی وابسته به چندین نسل است و هر نسل باید به غنای فرهنگی ملت خویش بیفزاید. فرهنگ اسپرانتو هم از این قاعده مستثنی نیست، و هرچند نیازمند نسل‌های متعددی برای تکامل خود است، ولی بی‌تردید زیرساخت‌های مستحکم آن هم‌اکنون نیز ایجاد شده است.

پس از اولین تجربه‌ها و باورمند نبودن پیشگامان اسپرانتو به خود، که در میان آنها نام شاعران، نویسندگان، هنرمندان و حتی آوازه‌خوانان قابلی نیز به چشم می‌خورد، نسل دوم گام در راه نهاد که نمونه‌ها و الگوهای لازم را در اختیار داشت.

ما هنوز به قدر کافی مسیر تکوین فرهنگ اسپرانتو را مورد مداقه قرار نداده‌ایم، لیکن صاحب قلم بر این باور است که فرهنگ اسپرانتو همچون فرهنگ هر ملتی تکامل طبیعی خود را طی می‌کند.

از آنجا که اسپرانتو در اروپا، و دقیق‌تر بگوییم، در مناطق اسلاوی اروپا متولد شد، فرهنگ آن، و اگر بخواهیم با دقت بیشتری بگوییم، ادبیات آن، از ادبیات غنی اسلاوی- روسی و لهستانی تاثیر بسیاری پذیرفت. زامنهوف، گرابوفسکی[۱]،

---

۱. آنتوان گرابوفسکی [Antoni Grabowski] (۱۸۵۷-۱۹۲۱) شیمی‌دان، زبان‌شناس و از پیشگامان تکامل زبان اسپرانتوست. از وی با عنوان پدر ادبیات اسپرانتو نیز یاد شده است. گرابوفسکی تا واپسین ایام زندگی خویش به توسعه و تکامل ادبیات اسپرانتو همت گماشت.

کابه[۲]، دویاتنین[۳] و تقریبا همه شاعران و نویسندگان پیرو مکتب اسلاو عناصری از ادبیات و فرهنگ اسلاوی را وارد ادبیات ما کردند که تنها و تنها ادبیات و فرهنگ اسپرانتوی جوان از آن بهره برد. پس از آن به لطف آثار برخی اسپرانتودانان بااستعداد فرانسوی جریان ادبیات فرانسه در دنیای اسپرانتو سربرآورد. اما به‌تدریج ادبیات اسپرانتو از زیر سایه این فرهنگ‌ها و سایر فرهنگ‌های ملی بیرون آمد و صداهای کاملا اصیل و تازه‌ای از آن به گوش رسید که سبب پیدایش انگیزه‌ها و ایده‌های نو در دنیای اسپرانتو گردید.
مسئولیت سنگین و مهم نسل دوم نویسندگان اسپرانتو هویت‌بخشی به ادبیاتمان بود و این‌که بستری برای رشد و شکوفایی نهال فرهنگ اسپرانتو فراهم آورند. نقش کالوچای[۴] و باگی[۵] در این میان بسیار زیاد است و با وجود آن‌که با ورود ایشان اسپرانتو تا حدی متاثر از ادبیات و فرهنگ مجار گشت، لیکن اولین صفات ممیزه فرهنگ نوین اسپرانتوی خود را نشان داد. به عقیده نگارنده سطور، ایشان نخستین معماران واقعی فرهنگمان هستند، چون درواقع راه زامنهوف، گرابوفسکی و کابه را ادامه دادند و باعث به وجود آمدن سنت در فرهنگ اسپرانتو شدند.
اگر نمونه ترجمه‌های گرابوفسکی نبود، الان نمی‌توانستیم ترجمه‌های عالی کالوچای و اشعار اصیل او را به اسپرانتو داشته باشیم. اگر یولیو باگی ترجمه‌های کابه، یا دقیق‌تر بگوییم ترجمه کلاسیک «فرعون» را در اختیار نمی‌داشت، سبک نثرنویسی زیبای او به اسپرانتو هم قابل تصور نبود.

---

۲. کابه نام مستعار دکتر کازی‌میژ بین [Kazimierz Bein] (۱۹۵۹-۱۸۷۲) چشم‌پزشک لهستانی، فرهنگ‌نویس، مترجم و اسپرانتودانی فعال طی مدتی محدود و نایب رئیس آکادمی اسپرانتو. او یکی از بزرگ‌ترین صاحبان سبک در اولین دوره ادبیات اسپرانتو بود.
۳. واسیلی نیکولایویچ دویاتنین[Vasilij Nikolajeviĉ DEVJATNIN] (۱۹۳۸-۱۸۶۲) معلم و اسپرانتودان روس و از سال ۱۹۰۵ عضو کمیته زبان اسپرانتو بود.
۴. کالمان کلوتچی یا کالمان کالوچای]به مجاری: Kálmán Kalocsay] (۱۹۷۶-۱۸۹۱)، پزشک جراح و شاعر مجار و از نخستین پیشگامان توسعه و تکامل ادبیات اسپرانتو بود. کالوچای، که در ۲۰ سالگی زبان اسپرانتو را آموخت، چهره‌ای اصلی در جهان ادبیات اسپرانتو محسوب می‌شود. وی از خود یک میراث غنی از زبان و فرهنگ اسپرانتو برجای گذاشت، از آن جمله است اشعاری که به زبان اسپرانتو سروده شده و همچنین ترجمه‌هایی که از زبان مجارستانی و دیگر زبان‌های اروپا به اسپرانتو انجام داده‌است.
۵. یولیو باقی در ۱۳ ژانویه ۱۸۹۱ در مجارستان (شهر Szeged) به دنیا آمد. در سال ۱۹۱۱ با اسپرانتو آشنا شد.در زمان جنگ جهانی اول به خدمت سربازی در ارتش مجارستان- اتریش رفت و در سپتامبر ۱۹۱۵ ارتش روسیه او را به اسارت گرفت و بیش از پنج سال در سیبری در اسارت به سر برد. در طول اسارت به تدریس اسپرانتو به اسیران جنگی و افراد غیرنظامی پرداخت و بدین‌وسیله فعالیت‌های اسپرانتویی خود را وسعت بخشید و به‌عنوان یک معلم مشهور شد. او عصرهای ادبی گوناگونی را برگزار کرد و نامگذاری روز تولد زامنهوف (۱۵ دسامبر) به عنوان روز کتاب اسپرانتو از ابداعات اوست.

کالوچای و باگی به سنت پیش از خود وفادار ماندند و آن را ادامه دادند. کالوچای مدت کوتاهی روی اوزان شعر اسپرانتو کار کرد و نمونه‌هایی عالی از سونت[۶]، بالاد[۷] و روندل[۸]های اسپرانتو از خود به‌جا گذاشت. باگی اولین رمان‌های مهم اسپرانتو را خلق و ثابت کرد که «زبان بین‌المللی» هم می‌تواند رمان داشته باشد. حتی در گلچین ادبی‌اش «قلب سبز» اسپرانتودانان نقش ایفا می‌کنند و به طور تلویحی، به بیان مشکلات مربوط به اسپرانتو هم می‌پردازد.
پس از جنگ جهانی دوم در آسمان فرهنگ اسپرانتوی ما اختران جدیدی ظاهر می‌شوند. آنها نه از خلأ، که از دل سنت اسپرانتو بیرون آمدند و گام در راه اسلاف و معلمان خود نهادند.
اگر کار ادبی کالوچای و یوگنی میخالسکی[۹] نبود حالا شاید نام ویلیام اولد[۱۰] چنین محکم با فرهنگ اسپرانتو گره نمی‌خورد. یا مارجوری بولتون[۱۱] و الی اوبانووا[۱۲] کی می‌توانستند به ژرفای پرتلاطم روح لطیف یک زن نفوذ کنند اگر پیش از آنها اشعار زیبا و شیرین هیلدا درسن[۱۳] نبود.

---

۶. سونِت یا غزل‌واره سبکی از شعرسرایی در ادبیات بعضی زبان‌های اروپایی، از جمله انگلیسی، فرانسوی، و ایتالیایی است. سونت قطعه شعری است که معمولاً دارای ۱۴ مصراع است و در پنج بحر سروده می‌شود. در مقایسه با ادبیات فارسی، سونت ساختاری بسیار شبیه به غزلِ دارد و در زمره ادبیات غنایی می‌گنجد. در سرودن سونت‌ها، معمولاً احساسات فردی، عشق، ستایش معشوق و اخلاقیات نقش بسیاری دارند.
۷. تصنیف یا افسانه‌سرایی قالبی منظوم و معمولاً روایت‌گونه در ادبیات جهان است که از شعرها و آهنگ‌های انگلیسی و ایرلندی اواخر قرون وسطی شروع شد و تا قرن نوزدهم در سراسر اروپا، و بعد از آن در آمریکا، استرالیا و شمال آفریقا مورد استفاده قرار می‌گیرد. این قالب از قرن هجدهم توسط شاعران و آهنگسازان برای ساخت اشعار و تصانیف بزمی به‌کار برده می‌شد.
۸. شکلی از اشعار تغزلی که ابتدا در زبان فرانسوی و در قرن ۱۴ میلادی به وجود آمد و سپس در زبان های دیگر نیز به کار گرفته شد: بندگردان عبارت از ۱۳ بیت با دو قافیه.
۹. یوگنی لسی‌فوویچ میخالسک‌ی [Eŭgeno MIĤALSKI] (۱۹۳۷-۱۸۹۷) شاعر اسپرانتودان و فعال جنبش کارگری اسپرانتو.
۱۰. ویلیام اُلد [William Auld] (۱۹۲۴-۲۰۰۶) یکی از مشهورترین نویسندگان، شاعران و سردبیران در دنیای زبان بین‌المللی اسپرانتو بود. وی اسکاتلندی بود و در طول عمر خود چندین بار، به خاطر نگاشتن بیش از ۵۰ کتاب به زبان فراساخته‌ی اسپرانتو، نامزد دریافت جایزه ادبی نوبل شد.
۱۱. مارجوری بولتون (به انگلیسی [Marjorie Boulton] (۲۰۱۷-۱۹۲۴) نویسنده، شاعره و اسپرانتودان بریتانیایی. بولتون به مدت ۲۴ سال ادبیات انگلیسی تدریس و بعد از سال ۱۹۷۰ به صورت تمام وقت روی تحقیقات و نوشتن تمرکز کرد.
۱۲. الیشکا اوربانووا [Eliška “Eli” URBANOVÁ] (۱۹۲۲-۲۰۱۲) شاعره اسپرانتو و اهل چک، عضو افتخاری UEA و عضو سابق کمیته زبان اسپرانتو.
۱۳. [Hilda Helene DRESEN] (۱۸۹۶-۱۹۸۱) شاعره اسپرانتو، اهل استونی.

از سوی دیگر، وقتی سخن از فرهنگ اسپرانتو به میان می‌آید نباید آن را فرهنگی محدود و کاملا مستقل دانست. این فرهنگ شاید هم‌زمان به پهناورترین فرهنگ‌های جهان هم تعلق داشته باشد. چون پدیدآورندگانش نمایندگان اقوام و ملل مختلف هستند و هرچند خواه‌ناخواه دنباله‌روی سنت‌های فرهنگ جوانمان هستند، انگیزه‌ها و عناصری از فرهنگ ملت خود را هم همراه می‌آورند. از این رو در ادبیات اسپرانتو با انگیزه‌های اسپانیایی، برزیلی یا ژاپنی‌ای روبه‌رویم که در فرهنگ هرکدام از کشورهای اروپایی یا آسیایی کمتر به چشم می‌خورد.

فرهنگ اسپرانتو هنوز بسیار جوان، اما به عقیده من، به‌سرعت در حال رشد و ترقی است و نه‌تنها ادبیات به اندازه کافی غنی آن، بلکه ادبیات نمایشی، تئاتر عروسکی و موسیقی‌اش گواهی بر این مدعاست.

مایه تاسف است که هنوز جای مجلات جامع ادبی بیشتر، ناشران باثبات‌تر کتاب، تئاترها و فیلم‌های بیشتر و مستمر، فرستنده‌های رادیو و تلویزیونی با پوشش فراگیرتر و البته مدارسی که گنجینه‌های فرهنگ اسپرانتو عشق به انسان را میان اسپرانتودانان جوان نشر دهد، خالی است. با این وجود، فرهنگ جوان اسپرانتو وجود دارد و همایش‌های گوناگون، جشنواره‌ها و مسابقات ملی کشورهای گوناگون در مورد دکلمه و آوازخوانی به اسپرانتو این موضوع را تصدیق می‌کند. امسال به‌عنوان یکی از اعضای هیات داوران مسابقه ملی دکلمه و آوازخوانی به اسپرانتو به شهر استارا زاگورا[۱۴] دعوت و مسحور عشق و علاقه جوانان پرشمار شرکت‌کننده در آن شدم. آنها اشعار اسپرانتوی شاعران برجسته معاصر را دکلمه می‌کردند و ترانه‌های اصیل بسیار زیبای اسپرانتو را می‌خواندند. و این‌ها نشان می‌دهد که نه‌تنها فرهنگ اسپرانتو وجود دارد و در دل این جوانان زنده است، بلکه آنها خود پدیدآورندگانش هستند. و ناخودآگاه می‌اندیشم، حرارتی که در دل این جوانان است هیچ‌گاه سرد نخواهد شد. به‌راستی این فرهنگ وجود دارد و خواهد داشت.

۱۴. ششمین شهر بزرگ بلغارستان.

Nova retejo de UEA en simpla Esperanto



La 19an de januaro ĉi-jare aperis nova retejo de UEA. Ĝia nomo estas uea.facila, kaj ĝi estas videbla ĉe: https://uea.facila.org. Ĝia celo estas prezenti la Esperanto-movadon al novaj esperantistoj per facila lingvaĵo. Tial ĝi estas taŭga por lernantoj, sed espereble ĝiaj mallongaj novaĵartikoloj povus esti interesaj ankaŭ por pli spertaj esperantistoj. Ĝi estas senpage abonebla, do ne necesas esti membro de UEA por legi ĝin kaj komenti.

La artikoloj konsistas ĉefe el novaĵoj kaj informoj pri la Esperato-movado, sed estas ankaŭ ĝeneralaj legaĵoj, informoj pri filmetoj kaj aliaj materialoj troveblaj tra la reto, kalendaro de estontaj kunvenoj kaj aliaj. Estas grave, ke la legantoj ne nur pasive legu, sed sentu sin parto de la afero, do ili havas eblecon komenti sub la artikoloj, prezenti sin en la paĝo "Niaj legantoj", kaj sendi mallongajn raportojn kaj fotojn pri lokaj agadoj.

La facila lingvaĵo de la artikoloj estas bazita sur la iama vortlisto de Kontakto, nun reviziita. Aldonitaj vortoj rilatas plejparte al komputado kaj Interreto, dum estis forigitaj kelkaj vortoj, kiuj ne ofte estas bezonataj en tia retejo. La reviziita vortlisto troviĝas ĉe: https://uea.facila.org/vortlisto/

